

## & Balado pri ulo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 261 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis kaj komponis Gianfranco Molle (Horo da opozicio, 1979). Baladigis Martin Strid (2015) per nova melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodioj:

<:29> ((#Molle: /soso soso mi h,So soso soso mi h;So soso soso mi h;mi sofa mire do h) ?

(#Strid: /do do remi fa;fa mimi rere do; so soso lala so;fa mimi rere do; (#Rekantaĵe: dodo remi fa fa; lala lala tila so; fafa sofa mi; dodo remi fa fa;))

)×9 )+

### (&Strofoj:

'1 /Estis foje ul' ; Tretinta per pied' ; Per nuda la pied' ; Fekaĵon en angul'

(×: **Paŝu per piedoj ; dancu, prancu ĝoje jen ; en la tondra ĉen' ; paŝu per piedoj.**)

'2 Li diris tuj ke li ; Per sia la pied' ; malpura la pied' ; Ne marŝi volis pli .....

'3 Ne estis tie akv' ; Por lav' de la pied' ; Por lav' de la pied' ; Ne estis tie akv' .....

'4 Li pensis per hakil' ; La kruron tranĉi for ; Ĉi-kruron tranĉis for ; Li haste per hakil' .....

'5 Li hastis eble tro ; Tranĉitas bona krur' ; Tranĉitas pura krur' ; De nia la hero' .....

'6 Tuj kaptis lin koler' ; Kaj venis al la mens' ; De li la firma pens' ; Tranĉendas eĉ ceter' .....

'7 Piedoj kuŝis du ; Malvarmaj kaj sen viv' ; kaj staris pro naiv' ; La ulo sur genu' .....

'8 Tranĉis la parti' ; Piedojn multajn for ; Piedojn bonajn for ; Ordonis la parti' .....

'9 Ekzistas tamen sed' ; Ĉar male ol en fabl' ; partie kun probabl' ; Rekreskas la pied' .....